

Esperanto en Svislando, 2a parto: Ernest Naville
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 439 1972.03.08 & 11

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum prelegaro ni prezentas al vi historieton de la esperanto-movado en Svislando helpe de tekstoj, kiujn ni ĉerpas el la revuo *Svisa Espero*.

A.- Estas al ni hodiaŭ malfacile imagi la ritmon de la disvolviĝo de esperanto komence de la dudeka jarcento. Antaŭ 1900 oni povis nombri la svisajn esperantistojn sur la fingroj de unu mano. Kaj subite, en du aŭ tri jaroj, ĉefe en la franclingva Svislando, sed tamen ankaŭ iom ĉie en nia landeto, malfermiĝis kursoj, kreiĝis grupoj, fondiĝis societoj. La gazetaro detalege raportis pri tiuj eventoj. Tiu disvolviĝo de esperanto ĉiam estis ligita fare de la tiamaj esperantistoj al la nomo de la ĝeneva filozofo Ernest Naville. Ŝajnas, ke trafa artikolo de tiu maljuna profesoro universitata vipis la intelektularon en Romandio (tio estas la franclingva Svislando).

Cl.- En februaro 1903 la unua numero de *Svisa Espero* komenciĝas per tiuj vortoj, en kroniko pri esperanto en Svislando : « *Ne volante rakonti detale la komencon de Esperanto en nia lando ni tamen deziras prezenti al nia prezidanto honora, sinjoro Ernest Naville, kunano de l' Franca Instituto, kiu ĉiam partiano de internacia lingvo, eldonis en la « Bibliothèque Universelle » (Marto 1900) artikolon tre favoran por Esperanto, kiun Ĝeneralo Sebert legis ĉe l' Akademio de Sciencoj kaj politikoj. De tiam la ideo progresadis.* »

A.- Ni pardonpetas pro la lingvaj eraroj, sed ni citis tiun tekston en ties originala formo. Tiuj eraroj atestas pri la ek-esperantisteco de la redaktoro de *Svisa Espero*, la advokato Théophile Renard, el Ĝenevo.

Cl.- Tri jarojn poste, la 28-an de aŭgusto 1906, okaze de la Solena Malfermo de la Dua Universala Kongreso de Esperanto en la ĝeneva teatrejo Victoria-Hall, estis laŭtlegita salut-letero de la filozofo Ernest Naville.

A.- Tiu franclingva dokumento vipis duafoje la intelektularon en Romandio. Pri la rezultoj de tiu vipado ni raportos dum la venontaj semajnoj. Hodiaŭ ni tradukos al vi erojn el tiu grava historia dokumento, kiun poste citados dum jaroj ĉiu propagandisto pri esperanto okaze de prelegoj kaj kursmalfermoj.

Cl.- Jen do eroj el tiu fama letero : « *La peto partopreni la Esperanto-kongreson, kiun la Organiza Komitato honorige sendis al mi, kaŭzis al mi duoblan bedaŭron : tiu ne povi persone ĉeesti tiun gravan kunvenon kaj tiu esti devigata verki en la franca kelkajn parolojn, kiujn mi estus ŝatinta skribi en bona Esperanto.* »

A.- Kaj Ernest Naville daŭrigas : « *De post multaj jaroj, de post almenaŭ tridek jaroj, mi havas la konvinkon, ke la starigo de internacia lingvo estas la natura produkto, la necesa produkto de la ĝenerala marŝado de la civilizo kaj speciale de la ĉiam pli granda multiĝo de la transport-rimedo. Al homoj, kies interrenkontiĝo ĉiutage estas pli facila, estas ĉiutage pli grave alporti la rimedon interkompreniĝi. Tiu aserto estas por mi certeco proksimume samvalora al geometria aksiomo.* »

Cl.- Ernest Naville poste klarigas, kiel li ekkonis esperanton : « *En la epoko, kiam la verko de Doktoro Zamenhof estis al mi konata, mi estis informita, ke Max Müller esprimis du opiniojn : La starigo de internacia lingvo, multe pli simpla ol la nunaj lingvoj, estas prava entrepreno. Inter ĉiuj celadoj en tiun direkton Esperanto estas tiu, al kiu oni devas alporti apogon.* »

A.- Tiuj asertoj instigis la filozofon Ernest Naville aktive interesiĝi pri esperanto. Aŭdu : « *Por kontroli, ke vere estis tiel, mi skribis al la fama oksforda profesoro, kiu havis la afablon respondi, ke mi estis bone informata. Antaŭ sia morto li alportis publikajn pruvojn pri sia aprobo al Esperanto.* »

Cl.- De tiam Ernest Naville atentege informiĝis pri la disvolviĝo de esperanto. Li invitis al si regule la gimnazianojn Edmond Privat kaj Hector Hodler, por esti informata pri la esperanto-aktualaĵoj, kaj tiuj kontaktoj, inter maljuna filozofo kaj agemaj knaboj, havis la rezultojn, kiujn vi konas : ili donis dinamismon al la agado de tiuj du junaj esperantistoj.

A.- En sia letero Ernest Naville klarigas, kial li persone ne lernis esperanton : « *Mi do fariĝis esperantisto, kvankam mi ne scias esperanton. Mi konas ĝin sufiĉe por scii, kiel simpla kaj facile lernebla ĝi estas ; sed mi ne ellernis ĝin ; mi estas kapabla nek paroli, nek skribi ĝin. Ĝojige ekzistas du tavoloj da personoj al kiuj la direktantoj de la movado, kiu vin kunigas, donas la rajton sin nomi esperantistoj : tiuj, kiuj scias la novan lingvon, ili estas la adeptoj ; kaj tiuj, kiuj, malhelpataj ĝin lerni pro personaj kaŭzoj, komprenas la grandan gravecon de la entrepreno, ĝin aprobas kaj faras ĉion eblan por ĝin favori ; ili estas la aprobantoj. Mi min listigas en la nombron de tiuj lastaj, en la tavolon de la humiluloj, kaj sen scii Esperanton, mi estas laborema esperantisto.* »

Cl.- Ernest Naville poste klarigas, ke pro sia granda aĝo, li ne plu havas la forton aldoni novan lingvon al la kvin fremdaj lingvoj, kiujn li lernis kaj forgesis (la latina, greka, hebrea, germana kaj itala). Aŭdu lin : « *Nun, kiam mi ekvivas mian naŭdekan jaron, mia maljuna laca kapo apenaŭ sufiĉas, kaj eĉ foje ne sufiĉas al la plenumado de miaj plej pozitivaj devoj. Pro tio mi sentas en mi nek la kapablon aldoni sepan lingvon, tiom facila ĝi estu, al la ses aliaj, kun kiuj mi iomete intimiĝis.* »

A.- Ernest Naville finis sian belan leteron per alvoko al agado. Multaj svisoj aŭdis tiun alvokon, alkurante al la prelegoj kaj kursoj, kiuj ĉie malfermiĝos.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!